


Kiam Stanislav Petrov savis la mondon

T. & M.: Krysztof Daletski, 2023



D A

1. Post nokt-me-zo, a-pud Mosk-vo en mil naŭ-cent-ok-dek tri
A7

La ser-van-ta o-fi-ci-ro si-dis en pri-gard-sta-ci',
D G

Dum la su-no ek-le-vi-gis ĉe a-li-a flank' de l' mond'
A7


Bri-li-gan-te nu-bojn, ki-uj ŝve-bis en ĉi-e-la rond'
D EM A D

En la ta-go ki-am Sta-nis-lav Pet-rov sa-vis la mon-don.

2. Ĉie estis protestantoj / multaj miloj sur la strat'
Kaj avertis pri la risko / de nuklea armilad'.
La regantoj mokis ilin, / ridis pri la angorem'.
Kiom protestantoj pravis / eĉ ne sciis ili mem
En la tago, kiam Stanislav Petrov savis la mondon.

3. Observante ĉiujn ilojn / Petrov vidis sur ekran'
La signalon, ke raketo / jam ekflugis de Montan'.
Restis unu kvaronhoro / ĝis anonco de l' alarm',
Malgraŭ pliaj kvar signaloj / taksis li je falsalarm'
En la tago, kiam Stanislav Petrov savis la mondon.

4. La horloĝa temp' proksimas / nun eĉ pli al noktomez'
Sed neniun ŝajnas ĝeni, / nek publika interes'.
Multaj serĉas eskaladon, / mokas pri diplomati'.
Ĉio ĉi min igas pensi / kaj demandi, kial ni



D EM A D

Plu e-spe-ras, ke ĉi-am ajn Pet-rov sa-vos la mon-don.

Ĉi tiu verko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonda (CC-BY). Tio signifas, ke estas permesite prezenti, multobligi, disvastigi aŭ registri la verkon senpage.